Esperanto servu la pacon!

# A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

№2(17) Februaro 1975

## SEJM-DELEGITOJ

Kian utilon donas la E-renkontiĝoj? Ni paroligas E-istojn, donas al ili eblecon konatiĝi kun novaj samideanoj, kun novaj urboj... Sed estas ankoraŭ unu tre grava utilo: preskaŭ dum ĉiu E-renkontiĝo okazadas kunsidoj de aktivuloj, alvenintaj el diversaj urboj, kaj aperas novaj ideoj.

En ĉi-artikolo mi volas rakonti pri la kunsido de aktivuloj, okazinta dum la Novjara festo en kadro de la renkontiĝo, organizita de "Juneco". La kunsidon partoprenis krom vilniusaj kaj ĥarjkovaj E-istoj ankaŭ reprezentantoj de Tallin, Kaŭnas, Ivanovo. Por ne superŝarĝi iun el la ĉeestintoj estis decidite dividi la taskon konatigi SEJM-anojn kun la rezultoj de la kunsido. Kiel respondeculo pri kontaktoj kun eksterlando mi prenis la taskon konigi al la "Aktuale"-legantoj la ideon, kiun oni povas nomi "SEJM-delegitoj".

Temas pri jeno. Preskaŭ ĉiu turisto-esperantisto, vojaĝanta aŭ vojaĝonta eksterlanden, uzante Jarlibron de UEA eltrovas tie la adresojn de UEA-delegitoj, kiuj povas helpi al li dum la vojaĝo. Sed ne malofte okazas diversaj miskomprenoj: jen tiu, jen alia adreso jam ne estas taŭga pro iu kaŭzo, kaj la turisto ne povas trovi helpon. Krome, ne ĉiu turisto estas membro de UEA kaj havas la Jarlibron kun la adresaro. Oftas okazoj, kiam turisto, veturanta en iun urbon, opinias, ke en ĝi tute ne ekzistas E-movado kaj eĉ E-unuopuloj.

SEJM povas kaj devas organizi helpon al eventualaj turistoj-esperantistoj el eksterlando. Por tiu celo necesas en iu el E-revuoj aperigi adresaron de SEJM-delegitoj.

Do mi proponas al ĉiuj SEJM-kluboj fari elekton de kluba SEJM-delegito, kiu nepre devas:

1. Bone scipovi Esperanton.
2. Havi bonajn rilatojn kun la loka E-societo (ne esti pasivulo).
3. Daŭre loĝi en sia urbo (ne nepra, sed dezirinda postulo) kaj havi konstantan adreson (ne superfluus ankaŭ hejma telefono).

La urboj, kiuj havas fortan E-movadon, povas ankaŭ elekti vicdelegitojn, kies celo estas helpi kaj anstataŭi la delegitojn. La vicdelegitojn ankaŭ devas sekvi la supremenciitaj kondiĉoj.

Mi proponas ankaŭ fari la elekton dum 1 – 1,5 da monatoj post la ricevo de "Aktuale" kun ĉi-artikolo. Post tiu tempo la donitaĵojn de la delegitoj kaj vicdelegitoj (plenaj nomo kaj adreso kun poŝtindekso, hejma telefonnumero) sendu al mi. Estas atendataj ankaŭ viaj rimarkoj kaj konsiloj ĉi-rilate kaj via opinio entute.

D.Cibulevskij,
v/prezidanto de SEJM pri eksterlandaj aferoj

## NIA KOMUNA AFERO

En la 15-a BET, precipe dum ĝia seminario, laŭ la temaro estis tuŝitaj tre gravaj problemoj de nia Movado: E-instruado kaj kluba laboro. Sed, bedaŭrinde, nur tuŝitaj. Laŭ la temo oni devis pripari, pridiskuti k i e l ni devas agi kaj k i e l ni devas organizi instruadon kaj instrui. Sed neniu menciis, kiel ni tion de-

vas fari. Kelkaj personoj parolis, tamen nur pri laboro en sia klubo aŭ grupo, sed neniu konkludis, ĉu ni ĉion bone faras, eble oni bezonus alimaniere. Estis parolite pri manko de instruistoj, pri malfacilaĵoj de instruado en lernejoj.

Sed pro kio strebi instrui E-on en lernejoj, se tio estas malfacile, se mankas instruistoj-pedagogoj, se lernantoj poste diskuras kaj ne partoprenas la Movadon, se lernantoj estas ege ŝarĝitaj kaj okupitaj? Kial en tiaj kondiĉoj ne direkti nian instruadon al plenkreskuloj, kiuj ne diskuras fininte la lernadon, kaj ne turni pli grandan atenton al E-kursoj, ja por ili ne estas nepre bezonataj profesiaj instruistoj. Tio ne signifas, ke mi estas kontraŭ la instruado en lernejoj, sed mi opinias, ke oni devas racie konsideri la cirkonstancojn kaj agi laŭ eblecoj. Pri kursoj al plenkreskuloj dum la seminario oni entute ne parolis, tamen devis paroli. La problemo pri instruistoj ankaŭ ne aspektas tre terure, kiel iu imagas. Oni devas konsideri tion, ke instruisto estas aŭ devas esti ĉiu E-isto. Nur tiam malaperos la problemo pri manko de instruistoj. Krome, instruante plenkreskajn homojn, oni havas pli grandan tujan utilon ol de lernantoj, kies plimulte post iom da tempo tutegale forgesas la lingvon. Restas demando, kiel, kielmaniere instrui, trovi plej efikan metodon. Tiu problemo restas diskutinda. La diskuto devis okazi dum la BET-seminario, tamen...

Bedaŭrinde, ne priparolita restis la demando pri la laboro en kluboj. La problemo - kiel labori, por ke nia laboro efiku, por ke ne diskuru la klubanoj, kiel pli multe eluzi la eblecojn kaj kapablojn de klubanoj, kiel altiri homojn en la klubon - ĝis nun estas aktuala. Pli multe da homoj - pli multe da diversaj talentoj kaj kapabloj; du ĉiam ankaŭ faros duoble pli ol unu. Kaj tio rekte rilatas nian Movadon kaj ĝian progreson.

Inter la kluboj ne aliĝintaj al SEJM forestas iu ajn kunlaboro, kaj ili, se ion faras, agas ĉiu aparte, izolite - ilian laboron neniu koordinas. La 15-a BET prezentis la bonan okazon priparoli ankaŭ tiun-ĉi problemon gravan, sed pri tio eĉ ne estis menciite.

En la kluboj ne aliĝintaj al SEJM, precipe en Ĉebaltio,estas multaj veteranoj, pensiuloj, kiuj, havante pli multe da tempo, povus pli celtrafe labori, se io instigus ilin kaj koordinus ilian laboron. Tiel oni povus eluzi la stagnantajn fortojn kaj doni rezervan utilon al nia Movado.

Dum lastaj jaroj de pozitiva flanko montris sin la kunlaboro de diversaj kluboj en kadro de SEJM. SEJM estas f o r m o d e k u n l a b o r o inter E-kluboj de Sovetunio. Ĉiujare SEJM-konferencoj kaj la Komitato penas koordini la E-movadon en la tuta lando. Al SEJM aliĝas ĉiujare pli kaj pli da E-kluboj (nun estas 44 kluboj kaj 25 individuaj subtenantoj). Ĉiujn aliĝintajn kaj subtenantajn klubojn kaj individuojn kunigas la monata primovada SEJM-informilo "Aktuale". Ĉu ni ne devas subteni tiun-ĉi iniciatan formon de interkluba kunlaboro? Devas! Nepre kaj urĝe!

Ĉiu klubo, ĉiu E-isto, kiu ĝis nun ankoraŭ ne aktivis, devas kompreni la gravecon de kunlaboro, kies bonan ekzemplon prezentas SEJM, kaj ne resti flanke, kontribui sian parteton al nia komuna afero. Tion eblas fari iĝante komence kandidato aŭ subtenanto de SEJM. Informilojn pri tio liveras V.Ŝilas. Nur per unueco kaj kunlaboro ni atingos la progreson de nia Movado.

Rimantas Keliuotis (Klaipeda)

## KIEL ORGANIZI INSTRUADON?

La artikolo de R.Keliuotis "Nia komuna afero" tuŝas tre gravan por nia Movado problemon: k i e l ni devas instrui, kiel ni devas o r g a n i z i instruadon. (Ni rimarku en parintezoj, ke dum E-

tendaroj oni organizas pedagogiajn seminariojn; kaj ni vidas paradoksan bildon: teoriuloj parolas pri "altaj materioj", kaj samtempe praktikuloj laboras, gvidante E-kursojn kaj ne havante pro tio eblecon partopreni la seminarion). Kiel instrui? Temas pri metodoj. Pedagogia proverbo sonas: kiom da homoj, tiom da metodoj. Pli precize: metodo estas homo. Se uzi militan terminon, metodo estas taktiko, kaj kiel o r g a n i z i estas strategio.

Por respondi la demandon - kiel organizi pedagogian proceson kun komencantoj - ni diros mallonge: laŭ lernolibro. Por organizi laboron kun progresantoj (kiuj ne havas lernolibron) ni devas agi alie. Dum la Viljandia E-tendaro mi rakontis pri mia "Konkura metodo" de laboro kun progresantoj, kaj tiu metodo estis aprobita. Dum la Kretinga E-tendaro ĝi jam estis provita kaj plaĉis al multaj. Permesu al mi mallonge ĝin priskribi.

La teoria fundamento de instruado estas eseo: "leksiko, poezia lingvo kaj frazeologio de Esperanto" kun amaso da ekzercoj kaj taskoj (pli ol 120). Mi ĝin intencas publikigi sur paĝoj de "Amikeco" poparte. Kiel daŭrigo de la menciita eseo aperis la ideo verki ekzercaron "Amuza gramatiko de Esperanto", kiu havos 500 ekzerco-taskojn kaj estos finita ĝis SEJT-17 (aŭgusto 1975).

La Konkura metodo estas hibrido de simpla lerneja leciono kun KGS. La devizo: Lerni kaj instrui bonhumore, multforme kaj interese! (Ĝi jam delonge ekzistas ĉe ĉeĥoj, hungaroj, francoj).

Materialoj: magnetofono, akordiono, bildoj, mapoj, kartetoj (por individua laboro) kaj tabloludoj. Por ekzameno ni uzis paĝetojn de "Unuiĝo".

Organiza strukturo: kursanaro estis dividita je du egalaj partoj (po 20 homoj), ni nomis ilin "teamoj"; ili havis sian nomon. Ĉiam teamon gvidis sperta instruanto, bona organizanto kaj postulema homo. Li havis helpanton (anstataŭanton) kaj stabon el 4 ĉelestroj (po 5 homoj en ĉelo). Kun la ĉelestroj teamestro laboris post tagmanĝo. Ĉiu teamo funkciis kiel memstara unuo, kaj ĉiu ano de teamo havis sian taskon; ĉiu homo estis funkciulo: kronikisto, ekkantisto, fotisto, akordionisto, redaktoro, kasisto (laŭ interkonsento ili kolektis kopekojn kaj aĉetis premiojn por la plej bona respondo dum leciono; oni ricevadis premiojn ĉiutage kaj mem aljuĝadis ilin). Ĉiu teamo devis ĉiutage eldoni sian murgazeton kaj poste prepari koncerteton; ĉar studado de kantoj estis deviga objekto de lernado. Estis juĝisto (ĵurio), kiu aljuĝis poentojn ĉiutage. Mi memoras, kiel sindone tiun funkcion plenumis Volodja Zibenkes.

Ĉiutage ni havis 3 studhorojn (kvankam justeco postulas 4) kaj unu horo post tagmanĝo estis en dispono de "serĝentoj" por individua laboro kaj plenumo de taskoj. Ĉiutage - kvinminuta pedagogia konsiliĝo (ĉefe temis pri homoj, ĉar ilia lingva nivelo estis tre diversa). La teamestroj devis bone koni la anaron jam en la unuaj du tagoj.

La unua leciono estis dediĉita al teoria materialo, la dua - por praktika leksiko, la tria - por kantoj kaj ekskursoj. Dum leciono ni 8-10 foje ŝanĝis rimedojn: informo, dialogo, divenado, raporto, legado, aŭskultado de magnetofono, surbendigado, monologia lingvaĵo, verkado de proponicioj ktp. Kaj ĉiam konkurado, konkurado: kiu pli saĝe, pli sprite, pli konscience diris, plenumis, faris. La ĉefinstruisto, ekzemple, rakontas pri sinonimoj, poste donas 16 taskojn (po 8 al ĉiu teamo). Duonon oni faras tuj, la alia estas hejma tasko. Konkurante, la teamoj donas unu al alia ŝercajn demandojn, rebusojn, ŝaradojn,.. Neniu enuas. Por konkurso de "kapitanoj" ni donis taskon: alporti en alumetskatoleto post 20 min. dek aĵojn kun komenca litero "A" - al unu teamo, kun "F" - al la dua. Por la dua tago - nova tasko: fari herbaron. Por la tria-priskribo de la vilaĝo, kie ni situas ktp.

Pri ĉiuj detaloj mi ne povas rakonti ĉi-tie. Sed mi estas certa: vi komprenis. Necesas nur kamaradeca helpo de instruistoj en starigo de la ped-eksperimento. Instruado estas ja la plej grava laboro dum E-tendaro. Vi pravas, Rimanto!

A.Rogov,
estro de la Metodika fako de SEJM

Havano, la 26-an de decembro/74
FELIĈAN 1975! "Jaro de la 15-a datreveno"

Karaj amikoj!

En lastaj jaroj aperis en kelkaj Esperantaj periodaĵoj sciigoj pri nia E-Movado en nia lando. Per tiu-ĉi letero, adresita precipe al landaj kaj internaciaj E-asocioj, ni deziras diskonigi resume nian nunan situacion kaj profiti la okazon por sendi varman saluton al ĉiuj.

Pro diversaj kialoj la lingvo problemo kaj Esperanto estas malmulte konataj en Kubo, interalie pro la fakto, ke en Ameriko la lingva mozaiko ne estas tre komplika. La ideo enkonduki iel Esperanton ŝajnas okulfrape "tro revolucia". De kiam fondiĝis la Havana Esperanto-Rondo, marte de la jaro 1972, ĝi komencis plenumi du celojn: unue, konsciigi la publikon pri la malfacilaĵoj, kiujn la lingvoj kreas, kaj due, instrui Esperanton al grupoj de laboristoj kaj studentoj.

Koncerne la unuan taskon, ni sukcesis aperigi artikolojn ĵurnale kaj radie. Kursojn ni organizis kaj en ŝtata entrepreno dank' al la helpo de sindikato, kaj en lernejo, kaj en biblioteko. Kiel ĉie en Esperantujo, multaj interesitoj komencis kaj malmultej finis, sed jam Esperanto ne estas rigardata de multaj havananoj kiel strangaĵo aŭ morta lingvo, kaj plue, multaj aktivuloj de nia movadeto estas edukitaj en tiuj kursoj. La laboro farita kreis la bazojn por novaj plenumotaj celoj: atingi oficialan apogon (ĉefe de la Ministerio pri Edukado) kaj disvastigon de niaj literaturo kaj revolucia verkaro per Esperanto.

Vere, jam en la jaro 1972 ni iniciatis interparolojn ĉe la Ministerio pri Edukado, kun la Nacia Direktoro de Lingvaj Lernejoj k-do Carlos Garcia. Post la pristudo de la petitaj informo kaj instruprogramo oni akceptis enkonduki kiel provo la E-instruadon en unu el la lingvaj lernejoj. Fortan puŝon tiudirekte faris la vizito al Kubo de prof-o Paul Neergaard, pri kiu oni povas legi pli detale en lia artikolo, aperinta en la revuo "Esperanto", aprilo 1973. Li havis kontakton kun vicministro Israel Montequin, kiu multe interesiĝis pri la afero. Tamen malgraŭ ĉiuj klopodoj, tro laboro de tiu departemento, kiu preparis tiam kondiĉojn por amasa instruado de la rusa lingvo, malpermesis efektivigi la planojn.

Komence de tiu-ĉi jaro ni decidis akiri almenaŭ oficialan rekonon. La Havana Esperanto-Rondo iĝis sufiĉe multnombra, kaj kun apogo je aliaj E-rondetoj kaj unuopuloj de nia lando ni preparis fondiĝon de Kuba Esperanto-Asocio.

La pasintan 17-an de aŭgusto ni havis Konstitucian Asembleon, en kiu ni diskutis kaj aprobis la regularon kaj elektis provizoran estraron. Ĉiuj dokumentoj estas prezentitaj al nia Ministerio pri la Interno, kies respondon ni atendas optimisme. Dume ni vivtenas progresantan kaj organizas estontan laboron.

KEA havas tre modestan libraron en la publika biblioteko, kiu troviĝas (ne hazarde) en la sama konstruaĵo de nia Ministerio pri Edukado. Ĝi estas prizorgata de nia respondeculino pri la biblioteko kaj de tieaj bibliotekistinoj kaj ekzistas dank' al sendaĵoj de frataj E-asocioj de socialismaj landoj (ĉefe de ĈEA, BEA, SEJM, VPEA kaj ĈEL) same kiel de internaciaj organizaĵoj TEJO, MEM kaj UEA.

Kubaj E-istoj kore dankas ĉiujn pro la sindona kaj bonvola helpo. Ni esperas, ke ni ankaŭ venontjare per nia praktika laboro povos kontribui al kresko de la signifo kaj utilo de nia kara Internacia Lingvo.

Lastatempe okazas progresemaj ŝanĝoj en la mondo. La kreskanta influo de socialismo kaj ĉiam pli evidenta bezono pri internacio interkomprenilo prosperigas iom post iom kondiĉojn, kiuj nepre permesos ĝeneraligi Esperanton. Granda instigo por nia laboro devas esti la kuraĝiga ekzemplo de la heroa Vjetnamo popolo, kies E-Asocio neniam haltigis la eldonadon de gravaj kaj altkvalitaj verkoj ĉe la bombado fare de usona imperiismo. Tiu sola ekzemplo pruvas la vortojn de D-ro Zamenhof:"La afero "Esperanto", nia etika movado,konsistas ne en rapideco, sed en certeco. Multe da sencelaj aferoj ekbrilis antaŭ la mondo rapide, sed ankaŭ rapide falis. Afero bona kaj certa progresas ordinare malrapide kaj kun grandaj malhelpoj. Ne malĝoju tial, Esperantistoj! Ni laboru kaj esperu!"

Ĝis la rekontakto, karaj geamikoj, per nia estonta modesta bulteno.

Plenuma Komitato de Kuba
Esperanto-Asocio

Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtkesto 314, Habana 1,
Kubo

La sinturno estas ricevita de V.Kazanova (Barn.)

## ANTAŬTENDARA KOMPANIO

Post bruaj diskutoj en la kluboj "Verda Horizonto" (U-Kamenogorsk), "Oazo" (Barnaul) kaj dum OSER-23 en Omsko la Organiza komitato de SEJT-17 akceptis decidon, kiun je la nomo de OK mi al ĉiuj legantoj de "Aktuale" proponas legi kaj aktive reeĥi per... sinproponoj.

Do estas decidite organizi kompanion el gejunuloj, kiuj libertempos jam ekde la 15-20 de julio, kaj kiu povus bonvole veni al la tendara loko por sub gvido de OK-anoj de SEJT-17:

1. Starigi tendojn por la tendarontoj.
2. Konstrui tegmenton polietilenan por kunvenoj en pluvtempo.
3. Prepari fajrejon por oportunaj vesperaj kunsidoj kaj kunkantoj ĉe lignofajro.
4. Elekti lokojn kaj eble iom prepari tiujn por la paroligaj kursoj kaj por ties tendoj.
5. Prepari por ekfunkcio la kuirejajn kaj manĝejajn"instalaĵojn",- ja la tendaro havos propran manĝejon.
6. Sunbruniĝi, parolpraktiki, naĝi, fiŝkapti, boati, laŭvice kuiri manĝaĵojn, ripozi post 4-5-horaj laboroj, menciitaj en la §§ 1-5, ktp.

OK antaŭvidas eklaboron de tiu kompanio la 21-24 de julio. La kondiĉoj estas jenaj: por 3-foja manĝaĵo necesas havi por ĉiu tago 2-2,5 rublojn, propran teleron, kuleron, kruĉon; oni loĝos en tendoj, dormos en dormosakoj. La unua tago enurba estos dediĉita al diversaj organizaj problemoj (en U-Kamenogorsk) kaj ĉiuj ceteraj laboroj estos plenumataj senpere ĉe la tendara loko. Al sinproponontoj la Organiza komitato sendos pli detalajn sciigojn pri la kondiĉoj de partopreno en la kompanio. La kompanianoj rajtos partopreni la SEJTon laŭ la ĝeneralaj kondiĉoj, - rabatoj ne estos. Sinproponojn, proponojn rilate l' kompanion kaj SEJT bonvolu adresi al la Prezidanto de OK laŭ la adreso:

492018 Ustj-Kamenogorsk-18, abon.k. 312, Anoĥin Boris Vasiljeviĉ.

La tempo flugas, la tempo kuras, geamikoj. Do bonvolu senprokraste turni vin al OK, aliĝu la kompanion! Bonvenaĵaj estas junuloj

junulinoj laboremaj, amikemaj.

Por sukcesigi la tendaron jam nun estas bezonata mono por rezervi manĝproduktojn. OK anoncas akcepton de aliĝmono, kiu estas 50, 48, 46 rubloj koncerne por laborantoj, gestudentoj kaj gelernantoj (kaj nur 48, 46, 44 por la sendontoj la monon ĝis la 1-a de majo). Tiuj sumoj enkluzivas ankaŭ la aliĝkotizon koncerne 6, 5, 4 rb. Bonvenigataj estos ankaŭ nekompletaj aliĝsumoj, kiuj estos minusitaj el la ĝenerala sumo ĉe la plena aliĝo.

La monon sendu laŭ la supremenciita adreso.

B. Anoĥin (U-Kamenogorsk)

## ALDONE AL LA LIBROAPERIGA KAMPANJO

La lanĉita kampanjo vere povus doni al ni iagradan rezulton. Sed por ke ĝi efektivigu niajn planojn, ni devas agi racie kaj pripensite. Ĉi-demande mi deziras eldiri kelkajn pensojn pure teknikajn aŭ doni kelkajn konsilojn. La adresaron eniras multaj eldonejoj. Antaŭ ol skribi al ili ni devus konatiĝi kun la specifeco de tiuj eldonejoj, kun iliaj eldondirektoj. Por tio la plej bona kaj la plej facila rimedo estas trarigardi porjarajn katalogojn (eldonplanojn) de tiuj eldonejoj. Ili estas en ĉiuj pli grandaj librovendejoj. Nur konatiĝinte kun tiuj katalogoj, ni vere ne preterpafos, sed ĝuste al la celo.

La leterojn oni devas laŭeble konformigi al la eldonaĵoj de koncerna eldonejo. Ankaŭ oni devas atenti la taskojn de la eldonejo, ekscii, kion ĝi celas, kian literaturon ĝi eldonas. Konsiderante tion, oni povas proponi ne nur tion, kio estas indikita en la krampoj post la adreso de koncerna instanco. Se ni skribas al la redakcio de iu gazeto, ni, unue, devus ekscii, kies organo ĝi estas, kies interesojn ĝi defendas. Certe, plej bone estas ekvidi la gazeton mem kaj trarigardi ĝin por havi ĝeneralan imagon, sub la titolo de ĉiu gazeto estas indikita, kies organo ĝi estas. Sed por tio ankaŭ taŭgas katalogo de aboneblaj periodaĵoj, kiun ĉiujare eldonas "Sojuzpjeĉatj". Multon diras la titolo de gazeto aŭ la titolo de instanco mem. Antaŭ ol skribi al iu instanco ni ankaŭ konatiĝu, kion faras tiu instanco, pro kio ĝi estas fondita, kiaj estas ĝiaj taskoj, ĉar, ekz., eldonejon ni povas peti <u>eldoni</u> ion, sed la redakcion de gazeto ni povas nur instigi al eldonado, nur turni ties atenton al la eldondemando en E-o. Ni ne demandu, ĉu ili eldonas ion en E-o, sed petu eldoni (pri neeldono ni jam devas scii), ĉar el respondo de eldonejo al S.Smetanina (vd. "A"-13, p.83) oni povas imagi, ke estis demandita, ĉu tiu eldonejo ion eldonas en E-o (eble mi eraras).

Ankoraŭ unu konsilo: nepre faru kopiojn de viaj leteroj kaj ĉiujn ilin metu en apartan paperujon, en la saman paperujon ni metu ankaŭ la ricevitajn respondojn. La leteroj, precipe tiuj de komencantoj, kursanoj,estu tralegataj antaŭ la forsendo en klubkunveno, aŭ ilin kontrolu iu aktivulo, por ke neokazu iaj miskomprenoj, konfuzoj, eĉ kuriozoj. Ĉiu, kiu kontaktas persone ĉiuj instancojn, ankaŭ oferu apartan paperujon por tiu-ĉi celo. La aktivuloj, kiuj gvidas la kampanjon en koncerna urbo, preparu specialajn listojn, kie estu jenaj donitaĵoj: kiu, kien, kiam forsendis (la daton, ĝis kiam oni devas verki, forsendi la leteron, la efektiva dato de forsendo), la dato de respondoricevo, kia rezulto ktp.

Se paroli pri la poentigo, al mi ŝajnas, ke ĝi devus esti speciale tre alta por stimuli partopreni en la kampanjo ĉiujn klubojn kaj multajn aktivulojn persone (iliaj leteroj donu poentojn al ilia klubo), ĉar por ni tamen gravas ne nur la kvalito, sed ankaŭ la multnombra kvanto de leteroj. Mi proponus ne malpli ol 5 poentojn por ĉiu letero. Kaj kiel vi pensas? De alia flanko, pro nepartopreno en

la kampanjo oni devus forpreni poentojn de tiu klubo samproporcie; la minimuma kvanto estas 22 leteroj, pro ĉiu neforsendita letero forprenu same 5 poentojn, pro superplenumo de la plano oni donu premiajn poentojn.

P. Jegorovas (Vilnius)

KONFERENCO PRI ROMANO DE B.APITZ "NUDA INTER LUPOJ"

La 11-an de aprilo 1975 progresuloj de la tuta mondo celebros la 30-an datrevenon de la liberiga ribelo en la koncentrejo Buchenwald.
Dediĉe al tiu-ĉi dato la 10-an de aprilo en Omsk okazos literatura konferenco pri romano de B.Apitz "Nuda inter lupoj", en kiu majstre estas priskribita la agado de la Internacia Barakara Komitato, preparinta kaj gvidinta la ribelon.
Solidareco de multnacia kolektivo de Homoj venkis kruelan perforton de Lupoj.
Ni invitas E-istojn el aliaj urboj partopreni la konferencon: sendu al ni viajn parolojn, surbendigitajn kun la rapideco 9,53 cm/s. Ĉiuj partoprenantoj ricevus surbendigon de la plena raporto pri la konferenco.
La interesitoj povas ricevi informon pri la plano de la konferenco ĉe V.V.Kulikov:
644007 OMSK-7, Sazanova, 33.

V.Kulikov (Omsk)

ANKORAŬFOJE PRI DISCIPLINO

Ĉiu scias, ke la plej bonaj okazoj praktiki lingvon estas tiu medio, kie senpere oni povas aŭdi kaj mem uzi la lingvon, kiu estas dezirata por lerni. Esperanton oni praktikas dum klubaj kunvenoj, marŝoj, renkontiĝoj, tendaroj k.s. Nia klubo dumjare organizas 4-5 renkontiĝojn aŭ marŝojn, kiujn partoprenas ankaŭ anoj de aliaj kluboj. E-renkontiĝoj estas ankaŭ bonega primovada lernejo.
Sed ni rigardu al la "nigra" flanko de niaj renkontiĝoj kaj, verŝajne, de ĉiuj renkontiĝoj en nia lando. Nin plej malkvietigas tiuj mankoj, kiuj starigas la organizantojn de renkontiĝoj al tre neoportuna stato. La plej dolora vergo estas subita veno de gastoj sen iu ajn anticipa informo. Ni ja ĉiuokaze en dissendata informilo tre klare indikas, la daton de aliĝo kaj monsendo. La informilon ni dissendas sufiĉe frue. Bedaŭrinde dum multaj jaroj ne estis okazo sen neatenditaj gastoj. Ni opinias, ke tio, kio estas en la informilo; oni devas tre atenti ĉar tie n e b e z o n a t a j vortoj ne estas. La venontoj devus detale konatiĝi kun la informilo kaj ĝustatempe plenumi ĉiujn ĝiajn postulojn. Estas okazoj, kiam oni nur sciiĝas pri veno, sed ne sendas monon. Komprenu, ke tiu mono estas bezonata antaŭ la renkontiĝo, sed ne post ĝi, kaj ni ne estas milionuloj. Pro tio oni devas sekvi ĝin ĝis la indikita dato. E s c e p t o k a z e, se jam estas tro malfrue, kaj veno de tiu aŭ alia homo estas necesa, la monon oni povas ne sendi, sed nepras telegrami aŭ alimaniere informi la organizantojn antaŭ kelkaj tagoj.
Ni venis al konkludo tute ne akcepti gastojn sen ilia ajna anticipa informo pri veno. Oni ne rajtas neglekti ankaŭ aliajn kondiĉojn de aliĝo. Se ni skribas, ke dormado estas nur en propraj dormosakoj, tio signifas, ke ni dormosakojn ne donos, kaj kiuj ne kunprenis ilin, tiu dormu laŭ sia bontrovo. Ŝajne tre facile komprenebla afero. Bedaŭrinde, tio ripetiĝas ĉiufoje, ĉar ni indiferente rigardas al similaj kondiĉoj aŭ simple neglektas ilin. Estas okazoj, kiam gastoj venas tro frue. Ni ne rifuzas akcepti ilin kaj organizi noktumadon, sed ni petas ankaŭ pri tio nin informi anticipe. La samon faru dezi-

rantoj resti en Vilnius dum kelkaj tagoj post la renkontiĝo.

Ankoraŭ unu vergo - "krokodiloj". La gvidantoj de kluboj devus limigi venadon de ili al renkontiĝo, ĉar ili vere negativas je sukceso de la renkontiĝo. Ni dezirus, ke ili ne superu 20% da ĉiuj venintoj (el ĉiu loko).

En ĉiu laboro, en ĉiu aranĝo plej gravas, ke ĉiu plenumu tion, kion li devas plenumi (ĝustatempe kaj bone). Tio rilatas kaj al la organizantoj, kaj al la gastoj. Nur per komunaj fortoj ni povas atingi rezulton, ĉiam pli proksiman al idealo. Se almenaŭ unu ĉeneto rompiĝas, tiam komenciĝas la ĉena reakcio, kaj iomgrade fiaskas la tuta aranĝo. Do la demando pri la disciplino kaj konscio restas aktuala. Estas tute klare, ke niaj renkontiĝoj estus pli interesaj, pli gajaj, pli malkomplikaj, pli utilaj kaj pli facile organizeblaj, se forestus tiaj, ŝajne tute facile forigeblaj, problemoj. La kluboj, kiuj iam organizis renkontiĝojn, tiajn problemojn spertis.

P.Jegorovas, S.Gajdamavičius ("Juneco", Vilnius)

## MALFELIĈAJ NEOLOGISMOJ

"Nur neologismoj, malbena serpento, povas mortigi la esperon, ke nia kara Esperanto venkos kaj prosperos".

G.Gercikov (Talgar)

Kiam mi tralegis la artikolon (faman artikolon!) de k-do Gercikov, mi ne sciis, kion pensi. Ĉu vere homo povas plenserioze skribi ion similan? (Ŝajnas, ke ne nur al mi venis tiu penso). Tamen la artikolo aperis, kaj ĝi postulas respondon. Mi supozas, ke multaj "asoj" de la E-movado kaj de la lingvo jam respondis, kaj dubas, ke mi povus aldoni ion novan. Mi volas diri nur jenon: antaŭ 20 jarcentoj en Eŭropo jam estis internacia lingvo - la latina lingvo. Ĝis nun ĝi restas la lingvo de sciencistoj, en ĉiuj universitatoj oni studas ĝin. Ĉu necesas elpensadi kaj enkonduki novan internacian lingvon? Ĉu ne estus multe pli facile refunkciigi la latinan? Tamen ni ne uzas ĝin kaj ne povas tion fari: la latina lingvo tro malnoviĝis ĝuste pro tio, ke en ĝi tute forestas neologismoj. Krestomatia iĝis la ŝerco: instruisto proponas al studentoj traduki el la rusa lingvo en la latinan la frazon: Li eltiris la naztukon el poŝo de sia pantalono. Evidentiĝas, ke ĝi ne estas tradukebla, ĉar en la antikva Romo ekzistis nek naztukoj, nek pantalonoj...

Nun la scienco evoluas rapidege, novaj nocioj aperas ne nur ĉiujare, sed eĉ ĉiutage. Mi dubas, ke Zamenhof en sia "Fundamenta krestomatio" povus antaŭvidi la vorton "kapron" aŭ, ekz., vortojn "faŝizm", "televidjenie", "kosmodrom"... Ĉu ni ne rajtas mem krei tiajn vortojn kaj devas esprimi niajn pensojn per komplikaj perifrazoj? Do la unua parto de neologismoj - tio estas novkreitaj vortoj por esprimi novaperintajn noeiojn. Sen ili la lingvo ne povas plenumi siajn funkciojn, ne povas ekzisti.

La dua speco de neologismoj - novaj vortoj, kiuj esprimas jam delonge ekzistantan nocion,, sinonimoj de iuj malnovaj vortoj. Kontraŭ tiuj neologismoj k-do Gercikov batalas precipe arde. Laŭ lia opinio, ili estas malutilaj, ĉiu neologismo-sinonimoj pereigas dekon da estontaj E-istoj. Sed de kio dependas la riĉeco de lingvo? Ĝuste de sinonimoj. Pro kio ĉiuj opinias, ke la rusa lingvo estas forta,, riĉa kaj bela? En la rusa lingvo ekzistas multegaj ĉenoj da sinonimoj, kaj ni ĉiam povas elekti la plej taŭgan. Ekzemple, por la vorto "kapo": golova, golovka, golovuŝka, baŝka, parlament, kotjelok...; por la vorto "morti": umjerjetj, skonĉatjsja, prestavitjsja, sdoĥnutj, otdatj koncy, datj duba, sygratj v jaŝĉik, otbrositj konjki, prikazatj dolgo ĵitj, ujti iz ĵizni... Jen, traduku ĉiujn-ĉi

esprimojn en E-on! Eĉ sufiksoj ne helpos!
Vi timas, ke, se ni uzos la vorton "febla", ni perdos homojn. Sed komencanto ĉiam povas diri "malforta", kaj li estos komprenita. Tamen rigardu niajn versojn kaj precipe kantojn - "arbaro" ĉiam rimiĝas kun "tendaro", "ĉielo" kun "stelo". Por la poezio sinonimoj estas necesaj kiel aero al la homo - nur tiam ĝi estos vere altnivela. Jen kontraŭ kio protestas la estimata k-do Gercikov. Se ni fidos al li kaj postsekvos liajn alvokon, post nelonga tempo Esperanto iĝos (jam iĝus delonge!) tute morta lingvo, same "senpantalona" kiel la latina, ne kapabla esprimi novajn nociojn, kaj vere similanta skemon. Kompreneble, mi ne kredas, ke k-do Gercikov serioze tion volas, mi esperas, ke li simple ŝercis. Aŭ volis doni pretekston por nova diskutado (sejes - do mi gratulas lin: li brile sukcesis!).

N. Korĵenevskaja (Ufa)

## LIBROAMATOROJ, ATENTU!

Strangulo j ornamas la mondon. La plej ofta speco de strangulo j estas kolektantoj. Dio mia! Kion do kolektadas homoj: alumetetikedojn, skatoletojn de cigaredoj, proverbojn kaj maldecajn anekdotojn, skarabojn kaj monerojn, uzitajn eksterlandajn pantalonojn kaj banejbiletajn...
Mi neniam opiniis, ke mi povas aniĝi tiun-ĉi kolektemulan genton. Tamen... Antaŭnelonge mi rimarkis, ke mi jam ne rajtas moke rideti pri tiuj-ĉi kompatindaj homoj, ĉar mi mem aniĝis ilin. Jes, mi mem fariĝis kolektanto de E-libroj, kaj pretas ekzekuti ĉiun, kiu ne agnoskas, ke kolektado de E-libroj estas la plej nobla okupo en la mondo.
Samfrenezuloj, geamikoj, kiuj suferas de la sama malsano! Nure al vi mi direktas mian voĉon! Malfacilas nia kolektemula vivo. Plena de embarasoj estas nia ŝatata okupo. Ĉio akireblas por mono, escepte la amon, junecon kaj E-librojn. Tamen imagu,ke subite la feliĉo ekridetis al vi, kaj vi akiris (Dio scias per kiu vojo) stakon da E-libroj, sed... samtitolajn. Kion fari? Certe, eblas vendi ilin ŝanĝi kontraŭ mizera mono. Ne, tio ne ĝoigos veran kolektanton!
Do sufiĉas enkonduki, jen estas mia propono. Ni aranĝu en tendaro ankoraŭ unu eron. (Multe da eroj finfine faras aron). Do estu en SEJT librointerŝanĝo (aŭ librumado, aŭ natura foiro de libroj, aŭ iel aliel), por ke ĉiu libroamatoro povus alportinte en tendaron stakon da samtitolaj E-aĵoj, elporti stakon da diversaj raraĵoj, kiuj ĝojigos la animon kaj samklubanojn.
Ni ne forgesu pri utileco de tiu-ĉi aranĝo por la Movado. Nun ni mendas tiom da libroj, kiom ni bezonas, eble iomete pli multe. Tamen sciante, ke ni en tendaro povos pliriĉigi nian bibliotekon, ni akirados E-librojn malavare, grandkvante. Per tio pligrandiĝos la kvanto de akirotaj libroj, kreskos la eldonkvanto de E-aĵoj. La resto de neinterŝanĝitaj libroj venos en la E-butikon, aktiviĝos ĝian agadon... Utileco por ĉiuj! Do reen al la pratempo, al aĵ-interŝanĝado!
Boĉjo Anoĥin! Plusu la proponitan eron al la tradicia aro da eroj! (Alivorte - ni aldonu al ER-ARO ankoraŭ unu eron).

G. Gercikov (Talgar)

## NOVJARA 13-aTTRADICIA RENKONTIĜO APUD VILNIUS

Anoj de "Juneco" ĉiam longe antaŭ iu renkontiĝo pensas: "Devas ĝi esti certe utila, interesa, alloga..." Same antaŭ la Novjaro-13. Ĉe ni, en Vilnius, ĉiam, kaj precipe por tiu-ĉi renkontiĝo, estas

certe malfacile trovi ejon. La kluban ejon ni por tiu celo neniam ricevas - Novan jaron en ĝi renkontas instruistoj (nia klubo troviĝas en la Domo de instruistoj). Trovi lokon estas la tasko de la renkontiĝa fako. Bone, ke ni havas Staseon - li ĉiam elturniĝas el tiu-ĉi komplikaĵo. Lokon li trovis ankaŭ ĉi-foje en... densa praarbaro apud Vilnius. Kaj ne nur lokon, sed ankaŭ pratempan vilaĝan (aŭ arbaran) domon kun esperdona forno. Kiel ĉiam aliaj taskoj kaj preparlaboroj estas por gejunecanoj jam kutima afero. Nia mastrino Grabeĵite ankaŭ jam estas sperta.

Kaj venis finfine la 365-a de la 74-a. Restas nur gastojn atendi. La unuaj aperis riganoj sub gvido de Talis Bercis. Sekvis unua, dua grupo, kiujn jam en la Vilniusa stacidomo atendis gejunecanoj. Pri ĝusteco de la vojo gastoj ne dubis: jam sur la busohalteja tabulo, kie oni devas elbusiĝi, estis montrilo, sekvis aliaj E-invitiloj; sloganoj invitis: "Nur rekte, kuraĝe...", "Jam la celo estas proksima"... Ĉe la pordego apud la pradomo-"edeno" staras "diablo". Li "enedenigas" gastojn nur post respondo al ĥiaj (vi komprenu, kiaj) demandoj. La mastrino regalas la gastojn per iu neklara trinkaĵo.

"Enedeniĝis" ĝuste 50 da dezirantoj el Latvio, Ĥarkovo, Tallin, Leningrado, Ivanovo; el kelkaj kluboj de Litovio venis reprezentantoj: el Kaŭnas, Šiauliai, Kapsukas. La salono-"edeno" estis plenŝtopita. Ĉiu havis eĉ apartajn tablon kaj seĝon. Ne gravas, ke ili estis preparitaj el arbostumpoj, kaj tio okupis ege "longan" tempon: 50 tablojn kaj 50 seĝojn nia arbaristo Kestas faris preskaŭ dum unu horo. Tamen sur tablon oni povis eĉ meti teleron kaj "propran" forketon kaj sur seĝon-sian propran...

Grandbalo daŭris ĝis malfrua vespero, kaj poste oni kun bruego alkuris la ornamitan Novjaran abion: oni anoncis, ke estos interesa, neripetebla elsendo el Esperantujo. Pri tio ĉiuj konvinkiĝis tuj.

Kaj jen 24$^{00}$. Fluas ĉampano, aŭdiĝas ŝmacaj kisoj, gratuloj... Alvenas la Avo Frosto. Vera. Li certe estis alportinta multajn donacetojn al la "edenanoj". Sed por ilin ricevi ĉiu devis iamaniere gajigi la Avon - li estis laca, frostinta, apenaŭ povis paroli. Se vi kantos, rakontossdecan anekdoton, dancetos - bonvolu Novjaran. Ankoraŭ longe daŭris E-kantoj, ludoj, ŝercoj. Estis jam mateno, kiam post reveno la mastroj regalis ĉiujn per ŝaŝlikoj.

Jam ĉi-jare ni atingis Vilniuson. Dezirantoj pli longe resti en Vilnius ankoraŭ ekskursis, vizitis siajn amikojn, partoprenis kunvenon de "Juneco".

Ĉiujn, kiuj jam estis ĉe ni kaj kiuj ankoraŭ ne estis, ni invitas al sekva ... Sed vi ricevos pli detalan invitilon al ...

Gejunecanoj: D. Janĉioraite
S. Gaidamaviĉius (Vilnius)

UFAJ ESPERANTISTOJ ENIRAS LA NOVAN JARON

Ĉiuj homoj komencas sian novan jaron la 1-an de januaro. E-istoj komencas novan jaron somere, en tendaro, kaj kun kalendara nova jaro ili komencas nur novan raportoperiodon. Do pasis preskaŭ duono da E-jaro. Eblas fari iujn konkludojn. En

En Ufa aferoj ne malbonas - en la klubon aperas kaj laboras proksimume 35 nemortaj animoj. Bone funkcias ĉiuj rondetoj. Altiĝas la ĝenerala lingva nivelo de meza ufa E-isto: nun - eĉ se forestas Kolker - ni parolas Esperante. Multaj niaj klubanoj ekflamis pri tradukado. Ljoŝa Aleksandrov sukcese tradukas versojn de Svetlov. Junula kantogrupo de la aviada instituto prezentis dum tutinstituta artkonkurso kelkajn E-kantojn. La kantoj kaj kantistoj tiel ekplaĉis, ke akiris rajton elpaŝi en la dua etapo de la konkurso.

En nia klubo aperis nova "malnova" E-istino - Roza Ahmadullina el Birsk. Nun ŝi ufaniĝis kaj tuj eklaboris: ŝi gvidas du rondetojn

(en lernejo kaj en rajkomo de komsomolo) kaj dum oktobro-novembro ŝi sola sukcesis fari 15 (dek kvin!) prelegojn pri Esperanto. Sanon kaj energion por vi, Roza! Feliĉan novan jaron!

Ne malbonas ankaŭ la priabonaj aferoj: sume geufanoj abonis preskaŭ 200 ekzemplerojn da E-revuoj kaj gazetoj. Ĝis nun daŭras la dissendado de lernolibro. Ni ricevas tute neatenditajn mendojn el Irkutsk, Petropavlovsk-na-Kamĉatke ktp. Ni esperas, ke dank' al ĉi-libro ni sukcesos Esperantigi iujn novajn urbojn.

Do la Ufa klubo komencas novan jaron kun batalhumoro kaj novaj fortoj kaj deziras la samon al ĉiuj aliuj kluboj.

N. Korĵenevskaja (Ufa)

"LAMPIRO" AGAS

Brulas vivo en nia malgrahda klubo. Post SEJT-16 ni preparis preparis prelegojn, kun kiuj preparis en urbaj lernejoj propagandante E-on por neesperantistoj. Komence de la lernojaro en nia lernejo ekfunkciis du kursoj: por kvin- kaj sesklasanoj kaj por pli aĝaj lernantoj. Al la kursoj venis lernantoj el kvin urbaj lernejoj.

Progresantoj, anoj de la klubo, preparis pri la tendaro fotoekspozicion, kiun ni montris en lernejo. Ni aktive partoprenis abonadon de E-revuoj: estas abonitaj ĉ. 40 revuoj de 12 titoloj. Nian klubon invitis la radio de la uzino "Kirovskij", kie ni preparis preskaŭ 40-minutan elsendon pri E-o, pri nia klubeto kaj pri E-kantoj. La elsendo okazis per la uzina radio trifoje (por tri laboralternoj). Ni partoprenis la festan renkontiĝon en Leningrado, kune festis la Tagon de Zamenhof. Nun estas preparata kabineto de E-o en nia lernejo, kie estos nia kluba biblioteko, ekspozicioj, albumoj, montrofenestro kaj diversaj helpiloj por instruisto; Krom tio ni aktive preparas nin al ĉi-jara E-somero; anoj de nia klubo intencas partopreni la renkontiĝon "E-o kaj naturo", la SEJM-konferencon kaj SEJT-17.

S. Aristarĥov (Tiĥvin)

## Informoj * Anoncoj * Petoj * Sciigoj

LA ANONCITA KAMPANJO "ELDONEJOJ" LARĜFRONTE EVOLUAS. LA KOMITATO TAKSAS LA PARTOPRENON EN ĜI JENE: ĈIU PRIVATA LETERO KOSTAS 2 POENTOJN, ĈIU OFICIALA KLUBA - 4 POENTOJN.

SEJM-Komitato

* * * * * * * * *

La E-klubo en SVERDLOVSK ne plu EKZISTAS (almenaŭ nuntempe), kaj aktiva laboro estas ĉesigita. Entia situacio mi opinias neetika ricevadi E-materialojn. Mi elkore dankas ĉiujn s-anojn pro la sendataj kaj senditaj materialoj kaj petas ne plu sendadi.

V. Ditjatjev (Sverdlovsk)

* * * * * * * * *

ROSTOV-DON

1. Laŭ sciigo de ĈEA-sekretario al "Meĵdunarodnaja kniga" estos (eble jam estas) oferitaj jenaj libroj:
   a) "Paŝoj al plena posedo", W.Auld;
   b) "Perdita vizaĝo" (scienc-fikcia kontraŭmilita), J.Nesvadba;
   c) "Sileziaj kantoj" (versoj), P.Bezruĉ;
   d) "Libro de apokrifoj", K.Capek
   e) "Bapto de caro Vladimiro" (poemo), H.Borovský;
   f) "Pri varmo" (teknika libro pri la fundamentaj konsideroj de

la scienco pri varmo), I.Tūma.

2. Mi akceptas abonpagojn por "Starto"-1975 (organo de ĈEA) ĝis la unua de marto; ekspedados mi, Aleksandr Melnikov
344007 ROSTOV-DON-7, abon. jaŝĉik 233.

* * * * * * * * *

VILNIUS, "Juneco"

ATENTIGO

Ni memorigas, ke ni havas kluban adreson. Do ĉiuj korespondaĵojn, kiuj koncernas la klubon, klubajn aferojn k.s. bv. direkti al ĝi, sed ne al S.Gajdamaviĉius, V.Bingelis, V.Ŝilas aŭ iu alia klubano aŭ eĉ samurbano. Nur sendante precipe gravajn korespondaĵojn, tuŝantajn SEJM-on ktp., oni povas aldoni al la kluba adreso la familinomon de la prezidanto aŭ SEJM-reprezentanto. Por personaj ligoj ĉiu klubano havas hejman adreson. Se Vi uzas la kluban adreson por pure privataj leteroj, sciu, ke ĉiu letero, kiu trafas nian poŝtkeston, estas tralegata de nia kluba sekretario, kaj ŝi/li decidas, ĉu la leteron transdoni al la adresito, ĉu direkti al paperujo de la kluba dokumentaro (depende de la enhavo). Do decidu (esceptokaze aldonu al la adreso la vorton "persone"). Nia adreso estas:

232000 VILNIUS, ab/k 61, junulara E-klubo "Juneco", Litova SSR.

* * * * * * * * *

En la revuo "Kultura i ĵiznj" №1 ĉi-jara devas aperi artikolo de D.Armand kaj S.Podkaminer pri MEM. Uzu ĝin en kontaktoj kun viaj lokaj pacdefendaj organizaĵoj.

V.Aroloviĉ (Moskvo)

* * * * * * * * *

KUJBIŜEV

La Urba junulara klubo (UJK) fine de novembro 1974 organizis reelekton de gvidantaro. En la novan gvidantaron eniris reprezentantoj de la klubo: Z.Skvorcova - prezidanto de la E-klubo, V.Volov kaj T.Semkova (en la revizian komisionon).

Dum la kunveno ĉiuj sekcioj de UJK raportis pri sia laboro. La klubo organizis E-ekspozicion kaj koncerteton.

En la urbo funkcias:

a) ĉe UJK 20-persona E-kurso, gvid. Z.Skvorcova;
b) ĉe la Inĝeniera-konstrua instituto 12-persona E-rondeto, gvidas V.Golov.

Krom tio en la urbo Sizranj ĉe kulturpalaco funkcias 15-persona E-rondeto (gvidas N.Dolganova), kaj en Toljatti en fako de la aŭtouzino 5-homan grupeton gvidas J.Kononenko.

Z.Skvorcova (Kujbiŝev)

* * * * * * * * *

1.La Esperanto-Redakcio de la Pola Radio disponas pri kelkcent ekzempleroj de la nov-aperinta E-libro "Pollando - nombroj kaj faktoj". La libron oni disponigas al ĉiuj eksterlandaj E-istoj, kiuj sin anoncas laŭ la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtfako 46, 006950 Varsovio, Pol.

2.Senpage estas ricevebla belega kolora faldfolio "Rostock" ĉe Rostock-informejo, Lange str. 5, DDR-25, ROSTOCK, GDR.

D E Z I R A S   K O R E S P O N D I

1.Pola skolta grupo: Komenda Hufca ZHP, ul. Pstrowskiego 12, 20-007 LUBLIN, Pollando.

2.Korespondamikojn serĉas: Esperanto-klubo, 2500 ESZTERGOM, Petöfi Müvelödési Häz, Hungario.

3.Por via lerneja E-koresp. kun Italio skribu al:
AEDE ĉe Dir. Didattica Barbanella, I-58100 GROSSETO, Italio.

S.Neilande, estrino de la Korespondа fako

---

Redaktis V.Ebel. Red.: 656099 BARNAUL-99, abon.k. 11, "Aktuale".